



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

J A R A B O N O

P. BABIN

Jarabono : 70 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1989 - 1


(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



La « ĝardeno de Francio » en la Mezepoko.



... Thomas Jefferson.

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Turenaj Kasteloj (E. Motillon)	3-4
La parola lingvo (G. Roux)	5-6
La ciklo de la krabo	7
Thomas Jefferson (P.B.)	8-10
Bakho (René Watier)	11
Paĝo de la geknaboj (J. Lehane)	12
Ludo: voĉa-senvoĉa (R. Gonin)	13
Por via Distro (C. Cavalié)	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

Ĉijare la esperanto-Domo malfermis siajn pordojn pli frue ol kutime. Jam la 24-an de marto alvenis partoprenantoj en la renkonto de la Komisiono de Eksteraj Rilatoj de TEJO. La programo estis riĉa kaj meznombro da 35 gejunuloj ĉeestis tiun agrablan renkonton.

La vizitantoj de la Esperanto-Domo konstato, ke dum la vintro, la projektitaj laboroj estis faritaj. La kuirejo estis refarbita kaj fariĝis hela agrabla laborejo. Ankaŭ la salono juniĝis dank'al refarbado kaj anstataŭigo de la eluzita malnova murtapeto per pli alloga murpapero. Granda spegulo akceptas la enirantojn kaj pligrandigas la ĉambron. Espereble la financoj, fine de 1989, ebligos la refaradon de la biblioteko kaj

de la oficejo, la lastaj du ĉambroj ankoraŭ netuŝitaj de post la aĉetado, fare de la Asocio, de la bieno Gresillon. En 1990 la tuta interno de la kastelo estos refarita. Necesis 38 jaroj da laboro kaj multaj zorgoj por plenumi tiun revon.



La geamikoj, kiuj jam en la 1960-aj jaroj vizitis Gresillon, certe memoras Germaine ROUX, diskretan kaj helpeman virinon. Dum pluraj jaroj ŝi havis sian parton en la prizorgado kaj la kulturaj aranĝoj de la Esperanto-Domo. Antaŭ kelkaj semajnoj ŝi diskrete mortis en sia soleco. Jam en decembro ŝi donis al ni la permeson denove aperigi artikolojn, kiujn ŝi verkis sekve de prelegoj, kiujn ŝi prezentis en Gresillon en 1965. La unuan artikolon vi legos en tiu ĉi numero de Kulturaj Kajeroj.

Esperanto tra la Mondo



POR LA FRANCLINGVAJ ESPERANTISTOJ-

D-ro Christian Bertin, 60, allée de la Renaudière, 35510 Cesson-Sévigné, Francio, informas pri la kreado de:

Esperanto-kurso por komputilo, pri 12 gramatikaj temoj; por komputilo akordigebla PC, kiel Amstrad PC1640HD20.

Franca Komitato por Aplikado de Esperanto en Scienco (FKAES); ne estas kotizo sed devigo ĉiujare verki aŭ traduki almenaŭ 5-paĝan sciencan artikolon en esperanton.

LA 74-a UNIVERSALA KONGRESO-

Ĉar la kongreso okazos ekster la ĉefurbo, en Brighton, oni organizas specialan antaŭkongreson en Londono, dum kiu oni solene lanĉos la kongreson kaj prezentos ĝin al la britaj eminentuloj kaj eksterlandaj diplomatoj. La ceremonio okazos en la fama Guildhall, kie oni akceptis Zamenhof en 1907.

La temo de la kongreso estos: "Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado."

En la programo, krom naŭ tuttagaj ekskursoj, oni povos ĝui modernajn britajn dramojn en esperanto kaj interesajn muzikajn prezentojn.

EL ĈINIO- La Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu uzas esperanton, etendis sian agadon ankaŭ sur la ekonomia kampo. Ĝiaj esplor-institutoj pretas subskribi kontraktojn kun eksterlandaj mez- kaj malgrandaj entreprenoj por esplorado, ekspluatado kaj produktado; ekz. pri kurac-drogoj, nutraĵoj, subproduktoj de natur-gaso. Kontaktoj en esperanto: Prof. Shen Chenzu, STEA, Academia Sinica, 52 Sanlihe, TJ-100 864 Beijing, Ĉinio.

MUZIKA SEMINARIO- De la 20-a ĝis la 30-a de junio, okazos Internacia Muzika Seminario en la Internacia Kursejo de Pisanica (Bulgario). Adreso: Pozitano 40, BG-1000 Sofia.

INTERNACIA VELO-SEMAJNO- De la 1-a ĝis la 8-a de julio, sur Ejsellago kaj Vadomaro (Nederlando), okazos internacia Velo-semajno. Ekiro el Stavoren, 45 mn. trajne de Leeuwarden. Informas: W. Dorleijn, Bolderikkamp. 196, NL-2353 GZ Leiderdorp.

EL HUNGARIO- Sub aŭspicio de Monda Turismo, okazos en Abaliget, de la 15-a ĝis la 24-a de julio, la 22-a Internacia renkonto esperantista naturamika, kun ekskursoj, naĝado, migrado, vizito de la urbo Pécs, kursoj, ktp. Skribu al IREN, Departementa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, Pécs, pf. 2, H-7601 Hungario.

LA ANGLA LINGVO EN DANGERO- Okaze de la Festivalo, kiu okazis en Nantes, la Kultura Centro Nantes-esperanto organizis, denove ĉijare, budon por prezentado de libroj kaj debaton. La temo estis: "La angla lingvo degeneras. Necesas protekti ĝin". Parolis, antaŭ okdek ĉeestantoj, la bone konataj Claude Piron kaj Marjorie Boulton. Temis kompreneble pri la ĝeneraligita fuŝa uzado de la angla "internacia" lingvo.

LASTTEMPE APERIS- "Postmilita japana antologio", 320 p. Noveloj kaj unu dramo de 12 aŭtoroj nuntempaj.

"Sanga Nupto" kaj "La domo de Bernarda Alba", tradukaĵoj de konataj dramoj de la fama hispana verkisto Federiko Garcia Lorca.

"Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas", de Manjo Austin. Agrabla romaneto el Irlando.

"Perfekta civitano". Ĉiuj noveloj en unu volumo de la hungara verkisto Sandor Szatmari.

En la serio de la literaturaj numeroj de "Franca Esperantisto": "La leteroj el mia muelejo" de A. Daudet, kaj "La infano el la alta maro kaj aliaj rakontoj" de Jules Supervielle.

Turenaj Kasteloj

X-a XII-a J. C.

.....Nun, ni promenadu tra tiu plaĉa regiono Touraine (Tureno), kaj ni vizitu kelkajn el ĝiaj famaj kasteloj. Sed, ĉar tiu senmova vojaĝo ebligas nin elekti niajn vizitlokojn, sen priatento pri distancoj, ni elektu la kronologian ordon. Eble, vi legis la esperantan tradukon de la fama romano de la angla verkisto WELLS: "La Tempomaŝino" Dank'al tiu maŝino, oni povas retroiri la tempon, kaj ĉeesti la vivadon dum la pasintaj jarcentoj. Nu! vizitante Turenon, ni trovos mirindajn atestantojn de la malaperintaj epokoj, kaj per ili, ni ekkonos la vivmanierojn de niaj antaŭuloj.

Ni unue vizitos la kastelon de Pressigny-la-Granda. Tiu ĉi impona fortikaĵo datumas de la XVII-a jarcento, sed ĝi entenas unu el la plej belaj kaj kompletaj muzeoj de la prahistorio. Tie situas unu el la plej vastaj prahistoriaj "laborejoj". La abundega blonda siliko de tiu landeto estis taŭga materio por la tiamaj homoj. En tuta Eŭropo oni trovis armilojn sendube fabrikatajn tie. De la plej antikva praepoko Tureno estis multloĝata kaj grava civiliza centro.

La unue konstruitaj kasteloj dum la X-a kaj XI-a jarcentoj estis nur potencaj fortikaĵoj. Neniu arta idealo gvidis la "majstrojn-masonistojn". Nur la militistan efikecon ili celis. La kastelo ĝenerale konsistis el aro da konstruaĵoj kvadrata ĉirkaŭanta internan korton. Dikaj muroj kun kvadrataj turoj. Unu sola pordego fermita de levebla ponto. Profundaj kaj larĝaj fosaĵoj, ĉiam plenaj de akvo, izolas la kastelon kaj estas malfacila obstaklo por la malamiko. La solaj aperturoj estas mallarĝaj embrazuroj tra kiuj la arkistoj povas pafi al la atakantoj ne riskante trafon de ties sagoj. Sur la supro de la turoj, kreneloj ebligas pafi restante ŝirmata.

Dum atako, sur la supro de la muroj, oni konstruas specojn de lignaj balkonoj, tra kiuj oni ĵetas ŝtonojn, bolantan oleon, fandigitan peĉon aŭ plumbon, eĉ blindigan cindron, flamantaj lignopecojn, ardantajn karbopecojn, kaŭstikan kalkon.

Tiam bataloj sur la kamparo estis maloftaj. Tuj kiam aperis la malamikoj, la kamparanoj loĝantaj en kabanjoj ĉe la piedo de la kastelo, sur la deklivo de la "feŭda monteto", rifuĝis en la fortikaĵon kaj fariĝis soldatoj por la defendo. Oni levis la levponton kaj la kastelo staris en sia fiera soleco, ĉirkaŭita de siaj fosaĵoj. Nur unu taktiko estis ebla por la atakanto: ŝtopi la fosaĵojn per tero kaj branĉofaskoj kaj surgrimpi la altajn murojn. Kaj fine, sieĝadi la fortikaĵon, kaj venki ĝiajn loĝantojn per malsato. Tial la defenda sistemo de la kasteloj kompletigis per gravaj subteraj ellaboraĵoj. Subteraj ĉambroj, longaj subteraj koridoroj estis elfositaj; Tiuj ĉi, ofte plurajn kilometrojn longaj, kondukis malproksimen en la kamparon. Ilia elirejo, kaŝita meze de arbaraj densaĵoj, aŭ en groto, aŭ interne de forlasita ŝtonminejo estis nevidebla kaj netrovebla de la malamikoj. La subteraĵoj de Angers kaj Tours, ekzemple, traboritaj sub la fluejo de la riverego Loire. Lastatempaj esploroj en Angers ebligis retrovi tian subteran vojon kun masonita volbo, kiu, trapasante sub la rivero finiĝas malproksime, trans la alia riverbordo. Ĝia elirejo estis trovita nur antaŭ kelkaj jaroj. Dank'al tiuj subteraĵoj la proviantigo de la fortikaĵo estis certigita. Ĝi ankaŭ utilis por la evakuado de la vunditoj, de la malsanuloj kaj de la "senutilaj buŝoj", t.e. de la nebatalantoj, infanoj kaj virinoj. Tial la sieĝoj daŭris longajn monatojn, kelkafoje tutajn jarojn.

Interne la kasteloj de la X-a kaj XI-a jarcentoj havas la saman krudan aspekton, kiel ekstere.

La tuta vivo de la Sinjora familio estiĝas en unu sola ĉambro, ĉe la unua etaĝo de la ĉefturo, alirebla nur per ŝtupetaro. Nenia ornamaĵo. Nenia aperturo, krom la pafembrazuroj tra kiuj vento blovas laŭvole. La arbotrunkoj brulantaj en la vasta kameno ne kapablas forigi la malsekecon. Neniu tapiŝo sur la planko. La meblaro konsistas el nur kelkaj kofroj, skabeloj, lignaj benkoj, tablo kaj litoj kun matracoj el pajlo kaj kortbirdaj plumoj. Manĝaĵoj estas kuiritaj en la kameno. Ili konsistas el rostita viando, ofte ĉasaĵo, kaj boĥigitaj legomoj. La manĝilaro konsistas el lignaj aŭ teraj teleroj, kuleroj lignaj aŭ feraj, glasoj el tero aŭ stano. La boteloj estas teraj vazoj aŭ speco de kukurbo sekigita. Forkoj ne ekzistas. Stanaj teleroj kaj pladoj estas luksaĵo.

Belaj ekzempleroj de tiuj fortikaĵoj estas la ruinaĵoj de la kastelo de Montbazon, kun sia impona kvadrata ĉefturo superstaranta la urbeton, kaj tiu de Montrichard duonruinigita. En Langeais, estas videbla ankaŭ la kvadrata ĉefturo de la unua kastelo. La kastelo de Loches, komencita dum la X-a jarcento, montras al ni, meze de pli malfruaj konstruaĵoj, eksterordinare grandankvadratan ĉefturon, kiu estas la centro de vastega fortikaĵo.

Kiam la Normanda Duko Vilhelmo estis konkerinta Anglujon, estiĝis longaj militoj inter la francaj kaj anglaj reĝoj. La Normanda Sinjoro ne nur rompis sian vasalan ligan al la franca reĝo, sed ankaŭ pretendis rajti la francan reĝecon. Heredinte la Anĵuan provincon, la anglaj princoj provis al militi la apudan Turenon. La plej konata el ili, Foulques Nerra, starigis ampleksan reton de fortikaĵoj, kies restaĵoj ankoraŭ kvazaŭ ŝutas nian regionon. Fine lia filo venkis la grafon de Blois kaj ekposedis Turenon, kiu refariĝos franca nur je la komenco de la XIII-a jarcento.

Depost la X-a jarcento, la militista scienco perfektigis. La arbalesto ebligas pafi malproksimen kvinmetrajn sagojn kun fera pinto, tiel fortike, ke ili trapenetas plurajn virojn. Ĵetmaŝinoj nomataj "balistoj", funkciantaj per risorto aŭ kontraŭpezilo, pafas ĝis 200 metrojn, ŝtonojn pezantajn 100 kilogramojn. Per ili oni ĵetas super la muroj, internen de la kastelo, brulantajn branĉofaskojn naskontajn incendion. Eĉ, oni ĵetas putriĝantajn bestajn kadavrojn por infekti la garnizonon. La mikroba milito estas ja malnova eltrovaĵo! Murmpiloj konsistas el dika trabego, arba trunko, pendigita horizontale per ĉenoj al speciala trabaro. Dekoj da viroj estas necesaj por movi ĝin. Ĝiaj senĉesaj batoj kontraŭ la muroj fine ŝancelas ilin kaj traboras breĉon. Kiam la grundo tion ebligas, oni strebas atingi la remparon per subtera fosaĵo, kaj de sube ĝin kolapsigi. La plej perfekta atakmaŝino estis la rulturo. Ĝi estas konstruita el ligno kaj tegita per bovaj feloj. Ĝi altas ĝis 50 metroj kaj povas enteni du aŭ tricent soldatojn. Ŝtopinte la fosaĵojn, oni konstruis lignan rulvojon. Per leviloj viroj rulŝovis la turon ĝis la piedo de la remparo. De la supro oni mallevis specon de levponto kaj la soldatoj impete surkuris sur la remparon. Iuj utiligis la breĉojn faritajn de la balistoj. Oni starigis ŝtupetarojn; ĉarpentistoj rapide instalas trabaĵojn kontraŭ la muroj; ŝnuregoj kun hokegoj estis suprenĵetataj kaj alkrociĝis al la muroj; soldatoj lerte grimpis per tiuj ŝnuroj. Tiamaniere oni atakis la kastelojn.

Parto de prelego farita de
E. Motillon
en Gresillon en julio 1958

La pazola lingvo

Rabelais diris: " Rido estas propre homa", sed singardeme li nenion diris pri lingvo, ĉar ĉu ĝi estas nur homa?

Kio estas lingvo? Estas ĉio, kio esprimas pensojn aŭ sentojn, esploradon de spiritaj kampoj. Do ni povas diri, ke ankaŭ bestoj havas lingvon, ĉar ili kapablas esprimi ĝojon aŭ doloron, deziron per krioj aŭ per sinteno. Oni rimarkis ke la superaj sovaĝaj mamuloj, kiuj ne havas klare prononcitan lingvon tamen uzas signalojn por interkompreniĝi. Tiuj signaloj estas aŭ sonaj, aŭ gestaj, aŭ odoraj.

La sciuro de Kalifornio kapablas aŭdigi kvin malsamajn sonojn por alarmi la kamaradojn, sed ĝi pli multe uzas odorajn kaj vostajn signalojn. La hurlanta simio uzas 15-20 sonojn, inter aliaj la malakutan sonon bone konatan de la loĝantoj de tropikaj regionoj, kiu grave rolas rilate al la konduto de la grupo okaze de danĝero. La simio de Tajlando uzas naŭ sonojn. La juna ĉimpanzo kapablas aŭdigi tridek du sonojn. En la cerbo de tiu besto oni trovis komencon de volvaĵo de Broca, kiu estas la centro de la homa kapablo. Tiuj sonoj estas herede fiksitaj kaj karakterizas la rason; junaj bestoj sole bredataj aŭdigas la karakterizajn rasajn sonojn. Estas kelkaj bestoj, kiuj kapablas prononci homajn vortojn, ekz. papagoj, pigoj... sed tio ne estas natura lingvo: per tiu lingvo ili ne kapablas interkompreniĝi kun aliaj samspecaj birdoj. Ni ne forgesu, ke birdoj havas lingvon, ke ilia kanto ne estas la sama laŭ la horoj kaj la okazoj. Sciencistoj kaj muzikistoj tre serioze pristudis tiun temon kaj inter aliaj O. Messiaen komponis gravan verkon pri la birdo-kantado. Pri la homaj lingvoj, ne plu temas pri heredaĵo; ili estas akiritaj per imitado laŭ tradicio.

La gesta kaj mimika lingvo estas tre evoluinta ĉe superaj mambestoj. Pluraj estas la ebloj de vizaĝa esprimo, kiam ili havas sufiĉe kompletan mukskolaron; grave ankaŭ rolas oreloj kaj vosto. La hirtiĝo, la elmonro de kelkaj haroj, la pozicio de la kornoj estas ankaŭ lingvo tute komprenebla por samspecaj bestoj.

La odora lingvo estas ebla dank'al haŭtaj glandoj, kiuj sekrecias odorojn por ni distingeblajn aŭ ne, sed sencoplenajn por la bestoj. Urino kaj fekaĵo estas tre preciza indiko. Ĉiuj konas la mirindan kapablon de la hunda nazo. Haŭtaj glandoj maloftiĝas ĉe la mambestoj laŭmezure, kiel regresas la cerbaj flarsensaj lobo kaj la odoraj lingvoj estas preskaŭ neblaj por la superaj simioj kaj la homoj.

Do, por la homoj, la ĉefa lingvo konsistas el sonoj produktitaj per la gorĝo, la lango, ktp. Konsekvence la sonoj estas multnombraj kaj diversaj. Pri tiu diverseco estas notinda la fajfa lingvo utiligata en unu malgranda insulo kanaria, Gomera. Pro vulkana grundo, la marŝado estas peniga kaj malfacila; por interkomuniki la loĝantoj uzas fajfan lingvon aŭdeblan ĝis 14-kilometra distanco, kiam la fajfanto estas lerta. Tiu komunikilo estas tre preciza kaj pli rapida ol videblaj signaloj. Ĝi estas tiom rapida, kiom la hispana parolado. Ĝi estas preciza, ĉar la fajfa sono estas pura; ĝi ne misformiĝas pro forteco kaj kiam la fajfisto deziras ion transdoni, fajfante li provas fari per la voĉaj organoj la samajn movojn necesajn por prononci la frazojn; la imitado de parolo estas sufiĉa por esti komprenebla.

Se lingvo estus propre homa la infanoj parolus sen ekstera helpo kaj same parolus uzante

la samajn vortojn. Sed oni scias, ke tio ne estas vera. La infanoj lernas paroli aŭdante paroli; surda infano komencas babili; sed ne ricevinte stimolon de aŭditaj sonoj baldaŭ ĝia babilado malprogresas kaj fariĝas krioj kaj gruntoj. Por la homoj la situacio estas biologie unika: ili ne havas la eblecon kompreni unu la alian trans granda distanco aŭ granda intertempo. Unue oni kredis la lingvon donaco de supernaturaj fortoj al homoj; kaj pro influo de kristanismo, ke la lingvo de la elektita popolo, la hebrea, estis fonto de ĉiuj homaj lingvoj. Multe da klopodoj pli malpli fantaziaj provis tion pruvi. Sed antropologio montris, ke tuj ĉe la komenco de la homaro, klare prononcita lingvo ne estis ebla; la studado de prahomaj kranioj montris, ke la iamaj homoj kapablis eligi nur sonojn, kriojn, ĝemojn, kiuj unue nekonsciaj fariĝis iom post iom konsciaj kaj simbolaj, ne apartigante objektojn kaj agojn. Sama sono havis plurajn sencojn. Sed gestoj klarigis, nuancigis, fortigis ilin. Ankoraŭ hodiaŭ gestoj havas gravan rolon okaze de konversacio. Parenteze oni povas noti la valoron de gesta lingvo por surdmutuloj kaj dancistoj.

D. Dalmaŭ diris: "Parolo ne estas natura signo". Fakte la senco de la vorto estas konvencio inter kelkaj homoj. Por indiki domon, homoj diras: domus, maison, house, casa... Vidu la tre specialan sencan de kelkaj ĉiutagaj vortoj uzataj de studentoj, de stratulaĉo, ktp. Same gestlingvo estas konvencia: en Turkio la kapgesto por "jes" signifas por ni "ne", kaj inverse. Do, lingvo estas simbola sistemo. Origine estis nek unu nek pluraj lingvoj; ĉiu homgrupo faris sian lingvon, kiu disvolviĝis laŭ la homa evoluado. Prahistoriajn postrestaĵojn oni trovis en tre nombraj kaj diversaj lokoj de la terglobo. La homoj ne kapablis uzi komunan lingvon, ili nenimaniere rilatis, ne havis similajn vivmanierojn. Kunfandiĝo de la lingvoj okazis laŭ hazardo de renkontoj. La lingvo

de la potencaj grupoj sin trudis al la aliaj. Dum jarcentoj, en Eŭropo, la grandaj komunaj lingvoj estas la greka, la latina, de la tiamaj plej potencaj ŝtatoj.

Kiam ni parolas, ni projekcias nian spiritan internan mondon eksteren pere de sonvibradoj. Tiuj sonoj tradukas, en alian internan menson, sperton iel similan al la sperto projekciita de nia menso. Laŭ Sapir: "La lingvo estas pure homa kaj neinstinkta metodo por komuniki ideojn, emociojn kaj dezirojn per sistemo de intence produktitaj simboloj". Kiam temas pri parola lingvo la simboloj estas sonaj. Per tiuj sonaj simboloj ni kapablas konigi niajn sentojn (kun vizaĝmimiko, membraj gestoj) aŭ sciigi ion al alia persono, aŭ agigi aliajn. Do, ĝi estas komenco de socia ligilo. Ĉu vi ne parolas pri vetero, pri sano, kiam vi renkontas iun, nur por la plezuro kontaktiĝi kun alia persono?

Por la homoj la parola lingvo ne sufiĉas; preskaŭ ĉiam instinkte, ili aldonas mimikon: miensignojn, sulkigon de la brovoj, gestojn, diversajn sintenadojn. El tiuj gestoj kelkaj estas tutmondaj: frotado de la montrofingro per la polekso signifas doni monon. Kiam estas distanco inter la homoj, aŭdaj signaloj estas uzataj: fajfado, tam-tamo, morsa sonaro. Aŭ vidaj signaloj: semaforoj, blanka flago; ankaŭ la uniformoj de policistoj sur la vojo estas bona averto por la aŭtomobilistoj. Nun la skriba lingvo malaperigis la mezepokajn ŝildojn sur la butikoj, ĉar la skriba lingvo pli kaj pli sintrudas en la ĉiutaga vivo de la homoj.

(Daŭrigota)

Germaine ROUX

La Ciklo de la Krabo

Josue de Castro, iama prezidanto de la Monda Asocio kontraŭ la Malsato, rakontis en noveleto, kiun li verkis, kiam li estis juna, ke en lia lando Brazilo, ekzistas homoj, kiuj vivas sur bordo de rivero en kabanaĉoj faritaj el pajlo kaj koto kaj kovritaj per ondolado. Ili vivtenas sin per la kraboj, kaj la kraboj vivtenas sin per la homoj. Ĉio homa en tiu parto de la lando estas, estis aŭ estos krabo. Pro tio la aŭtoro konsciigis pri la malsato kaj subevoluinteco kaj studis la problemon. Kiel medicinisto li faris klinikan tabelon de la malsano, Malsato. Li montris, ke tiu aŭ tiu ĉi popolo ne malsatas pro mallaboremo sed inverse, ke ĝi estas mallaborema pro malsato. Por pliprofundigi sian esploron, Josue de Castro studis antropologion kaj la homan geografion. Li montris, ke ne nur senmiksaj rasoj estas laboremaj ĉar, kiuj popoloj povas aserti, ke ili ne estas la rezulto de la miksado de diversrasaj invadintoj?

Kio estas malsato? Tra la jarcentoj, fakte ĝis antaŭ kelkaj jaroj, ĝi estis "la deziro al manĝo". Ĝi estis konsiderata fakto natura. La malsatantoj ne konsciis pri la kialo de tiu malsato. Ili plej ofte atendis kaj preĝis. Ankoraŭ nuntempe multaj el ili atendas, ke Dio nutru ilin. Gandhi sidis en la dezerto kaj preĝis. Sed Nehru preferis, ke oni irigaciu la dezerton, "ĉar", li diris, "estas freneze paroli pri Dio, kiam la homoj malsatas kaj mortas".

La granda malkovro de kelkaj modernaj sciencistoj estas la difino de la kaŭzoj de malsato, kaj la esploro de la rimedoj, de la "kuraciloj" por lukti kontraŭ tiu malsano. Despli grava estas tiu laboro, ke malsato estas unu el la kaŭzoj de milito. Niaj prapatroj fabrikis la unuajn armilojn por ĉasi, por sin nutri. Tiutempa ĉasado estis deviga laboro. Ĝi nuntempe

fariĝis nur sporto. Kiam la homoj kultivis la grundon ili uzis la ĉas-armilojn por defendi siajn kampojn aŭ preni la rikoltojn de la aliaj. La milito estis necesa. Sed malsato kaj milito estas nur transiraj solvoj, kiujn oni povas elimini, pro tio ke ili ne estas parto de la homa strukturo.

Kiuj estas la rimedoj por elimini malsaton? Ĉu oni ne diras, ke la homoj estas tro multaj sur la tero? Tio ne estas vera, ĉar nur dek procentoj de la grundo estas kultivitaj kaj kelkfoje malbone kultivitaj. Tri homoj en dezerto, tio estas troloĝado. Tri mil homoj en irigaciita dezerto, tio povas esti subloĝado. Oni diras, ke granda parto el la monda grundo estas tro seka aŭ tro tralasiva. Sed la nunaj konoj ebligas la fekundigon de nefekundaj grundoj. Tion oni faris en Izraelo, en Kalifornio kaj en Centra Azio. Sed estas necese ne malekvilibrigi la elvolviĝon de popolo per aplikado de nur partaj solvoj. Kiam oni enkondukas, en iun landon, la porinfanan kuracadon, estas necese ankaŭ pensi, ke oni devos nutri la infanojn tiamaniere savitajn. Se lando akcelas sian industriiĝon, ĝine rajtas preteratenti la plifortigon de sia terkulturado: se ne, baldaŭ venos revolucio.

Tiaj estis la ĉefaj ideoj de Josue de Castro antaŭ pli ol dudek jaroj. Li deziris, ke la homo sin forsavu el "la ciklo de la krabo". Tio estas ebla se ni konscias, ke ĉiuj krudaj materialoj estas anstataŭigeblaj, sintezeblaj, transmutacieblaj. Nur la homa imagpovo estas neanstataŭigebla natura riĉofonto. Kondiĉe, ke ĝi ne serĉu riĉofonton por si mem.

Thomas Jefferson

Paralele okazis en 1789 du eventoj, kiuj, rekte aŭ nerekte, ŝanĝis la mondon: la 4-an de februaro estis elektita la unua Prezidento de la Respubliko de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko; tiu elekto estis la logika konsekvenco de eventoj, kiuj okazis jam dum dek-kvar jaroj. La 1'-an de julio 1789 estis la komenca eksplodo de longa, malkvieta sed riĉa periodo. Forgesante la regulojn de geometrio ni diros, ke tiuj paraleloj havis unu el siaj fontoj komuna. La 2-an de julio 1776 la Kongreso de la Amerikaj Kolonioj adoptis la Deklaracion de Sendependeco aprobita de la ŝtataj delegacioj la 4-an de la sama monato. En la dua paragrafo de tiu Deklaracio oni povas legi: "Se iaspeca registaro ne agnoskas la homajn rajtojn pri egaleco, vivo, feliĉo-serĉado, kaj la neceson de registaro, kies justa potenco devenas de la konsento de la regatoj, la popolo havas la rajton modifi, eĉ eksigi ĝin... Kiam homoj estas submetitaj al absoluta despotismo, ili rajtas, eĉ devas ŝanĝi la kulpantan registaron". Tiu teksto, verkita de Thomas Jefferson, larĝe inspiris la redaktantojn de la franca Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu en sia lasta paragrafo diras: "Estas okazoj, kiam ribelado povas esti, por la popolo, urĝa, sankta devo".

Kiuj homoj en Ameriko aŭdacis skribi, ne en libroj sed en oficialaj tekstoj, ke neniu registaro rajtas estri nacion sen la konsento de la estratoj, kaj samtempe pravigis la francajn revoluciulojn?

Georges Washington unua prezidento de USONO estas tre fama en la mondo ankaŭ ĉar li gvidis la junajn unuiĝintajn ŝtatojn sur la militkampoj kontraŭ la armeoj de la brita

reĝo, kiu ne komprenis, ke la amerikaj kolonioj adoltiĝis. Per tiuj militaj faroj Washington, eble nevole, partoprenis en la ekfunkciigo de maŝino, kiu kondukis al la Deklaracio de Sendependeco, kiu agnoskas la egalecon de rajtoj inter ĉiuj homoj. Ni devas tamen noti, ke, kiam la franca Konvencio aboliciis la sklavsistemon, Washington ankoraŭ havis sklavojn, kiujn li konsideris "sia hereda havaĵo". Sed, ankaŭ nevole, li, kun aliaj, generis la Secesian Militon kaj la abolicion de la sklaveco.

Ankaŭ Thomas Jefferson havis sklavojn kvankam li mem redaktis la tekston de la Deklaracio de junio 1776. Li ne estas tiom fama, kiom Washington. Li estis politikisto kaj estas interese iom pli bone koni viron, kiu influis la estontecon de sia lando kaj ankaŭ la Francan Revolucion nerekte per siaj verkoj kaj rekte, kiam li estis, ĝis 1790, ambasadoro de Usono en Parizo.

Thomas Jefferson naskiĝis en la kolonio Virginio, kiel G. Washington, sed 11 jarojn poste. Lia patro estis tabak-plantisto, vera tiama pioniro. Li mortis, kiam Thomas estis nur 15-jara. La filo decidis daŭrigi sian studadon en Williamsburg, la "granda urbo". En la kolegio, li amikiĝis kun la juna instruisto pri matematiko kaj filozofio, la sola kiu ne estis pastro. Tiu instruisto, William Small, multe influis la opiniojn de Thomas. Post diplomiĝo la studento deziris studi la juron. W. Small trovis por li postenon en la oficejo de iu advokato, amiko lia. Tiu advokato estis konsiderata kiel strangulo ĉar li liberigis siajn sklavojn. Tiam Thomas estis altstatura malgrasa, osteca, flavhara, kun vizaĝo kovrita je efelidoj. Kvankam li zorgis pri la familia bieno li plej ofte loĝis en Williamsburg.

Tiam, en 1763, en Virginio kiel en la aliaj britaj kolonioj, la Anglikana Eklezio estis la oficiala eklezio. Ĉiuj loĝantoj, eĉ ne anglikanoj, devis pagi per tabako la prizorgadon de la Eklezio,

inkluzive de la salajroj de la pastroj. En 1758, ĉar la tabakrikolto estis malbona, nesufiĉa, la Asembleo de la Burĝoj decidis pagi la salajrojn de la pastroj per mono. La angla guberniestro aprobis tiun decidon. La pastroj apelaciis al la angla registaro, kiu deklaris ilin pravaj. Ili postulis pagon de 16 000 pundoj da tabako. La plantistoj ne konsentis kaj elektis amikon de Jefferson, kiel advokaton. Tiu ĉi diris, ke la reĝo perdis mem sian rajton esti obeata de la popolo ĉar lia Privata Konsilio kontraŭstaris decidon de la Asembleo de Virginio. La tribunalo deklaris la Asembleon rajta. Tiu juĝo estis unua averto al la brita registaro kaj influis la postajn agojn de Jefferson.

Kiam li estis dudek-kvar jara Thomas Jefferson fariĝis advokato, kvankam mankis al li la paroltalento. Li zorgis nur duone pri sia oficejo ĉar li pasigis multan tempon en la familia bieno, kie li tiam konstruigis domon. Lia bopatro mortis kaj lasis al li la posedon de granda bieno kaj cent tridek sklavoĵoj. Thomas estis elektita deputito ĉe la Asembleo de Burĝoj. La rilatoj inter la kolonio kaj la brita registaro fariĝis pli kaj pli malfacilaj. La Asembleo decidis, ke nur ĝi rajtas decidi pri la pagotaj impostoj. La guberniestro eksigis la Asembleon. Ĉiuj deputitoj estis reelektitaj de la Virginianoj. En 1773 ili fondis specon de interkolonia inform-servo. Fine de la jaro dek el la dek-tri kolonioj havis similan servon.

Denove la guberniestro eksigis la Asembleon. La deputitoj kunvenis kaj decidis, ke "atako kontraŭ unu el la kolonioj estas atako kontraŭ la tuto de la brita Ameriko". La unua tutkontinenta kongreso okazis en septembro 1774. Thomas Jefferson ne povis ĉeesti pro malsano. Sed li sendis siajn ideojn skribitajn en longa teksto. Fakte, temis pri la unua formo de la Deklaracio de Sendependeco. Tiu teksto estis konsiderata iom

tro revolucia kaj la Kongreso decidis nur pri bojkotado de la anglaj varoj kaj ĉeso de eksportado al la metropolo. En marto 1775 la deputitoj decidis starigi virginian armeon de volontuloj. Brita provo disigi la koloniojn unu de la alia tute fiaskis. Nova Kontinenta Kongreso kunvenis en Filadelfio meze de la jaro. Thomas Jefferson ĉeestis. Li estis unu el tiuj, kiuj ricevis la nomon "fondo-patroj", kvankam la plej aĝa el tiuj "patroj", G. Washington, estis nur 44-jara. Li estis famiĝinta pro siaj skribaj verkoj, pro sia talento verki proklamojn kaj decidojn. En marto 1776 aperis pamfleto skribita de Th. Paine en kiu la aŭtoro diris ke "Georgo la Tria estas reĝa brutulo" kaj, ke "alvenis la tempo disiĝi". Komitato estis elektita cele al la redaktado de Deklaro de Sendependeco. Kompreneble Thomas Jefferson prezentis denove sian tekston. Kelkaj delegitoj ankoraŭ opiniis, ke oni devas trovi kompromison kun la brita registaro. Dum du semajnoj Jefferson verkis antaŭprojekton, kiu estis adoptita de la Kongreso la 2-an de julio kaj de la reprezentantoj de la diversaj kolonioj la 4-an de julio.

Thomas Jefferson revenis al sia bieno. La milito por sendependeco daŭros kun malvenkoj kaj venkoj. G. Washington estis ĉefgeneralulo de la armeo. Jefferson helpis en la starigo de sendependa registaro de la kolonioj fariĝantaj ŝtatoj. Dum du jaroj li estis ŝtatestro de Virginio. Sed li ŝajne ne esti kapabla mastri la dramatan situacion de la ŝtato atakata de la Angloj, kiuj prefere militis kontraŭ la sudaj "kolonioj", kaj bruligis la rikoltojn. La "volontuloj" de Virginio pli emis defendi sian bienon kaj familion ol la novbakitan ŝtaton. Feliĉe la Francoj decidis helpi la Unuiĝintajn Ŝtatojn kaj la Angloj estis venkitaj. La edzino de Jefferson mortis juna, 34-jara. En 1783 Thomas estas reprezentanto de Virginio en la Kongreso de la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Li multe laboras prizorgante la verkadon de nova konstitucio por Virginio kaj la starigon de administrado kaj financa sistemo. Lia propono de mon-sistemo ankoraŭ

validas. La Konfederacio estis kreita sed propono de Jefferson forigi la sklavecon ek de 1800 ne estis akceptita pro manko de unu voĉo en la voĉdono.

En 1784 Jefferson estis sendita al Parizo kun Benjamin Franklin kaj John Adams. La tri viroj estis komisiitaj starigi komercajn rilatojn kun la eŭropaj landoj. Kiam Franklin reiris Amerikon, John Adams estis sendita al Londono kaj Jefferson restis en Parizo. Li konatiĝis kun la pariza mondumo dank'al Lafayette, kiun li jam konis en Virginio dum la milito kontraŭ la Britoj. Li kompreneble provis reguligi la komercajn interrilatojn kaj la repagon de la ŝuldoj de la nova respubliko. Kvankam li konstatis, ke la eŭropaj landoj ankoraŭ ne tute fidis la amerikan registaron, li sukcesis iom post iom malstreĉigi la komercajn ligilojn, kiuj ankoraŭ dependigis la Konfederacion de la Angloj. Samtempe establiĝis ligiloj inter la Konfederacio kaj Francio. Lia interveno en la disvolviĝo de la unuaj monatoj de la Franca Revolucio ne estis kritikata de la franca registaro, ĉar, kvankam li estis respublikano, li konsilis Lafayette trovi kompromison kun la monarkio; kvankam li estis malamiko de la Angloj, li proponis, kiel modelon, la britan monarkion. En septembro 1789 li reiris Amerikon.

La novelektita unua prezidento de Usono nomis lin ŝtata sekretario pri Eksteraj Aferoj, de federacia registaro ankoraŭ difinanta sian rolon. En 1791 li estis implikita en kverelo sine de la registaro. Li apogis tekston favoran al la Franca Revolucio verkitan de James Madison, sed ne aprobitan de la vic-prezidento John Adams nek de la Sekretario pri Financoj John Hamilton. Nevole Jefferson fariĝas estro de partio baldaŭ nomita "respublikana". G. Washington konsentas esti prezidento duan fojon por eviti gravajn konfliktojn inter la "angla klano" de Hamilton kaj la "franca klano" de Jefferson.

En 1797 du viroj kandidatiĝas por esti la tria prezidento de Usono: John Adams kaj Thomas Jefferson. La unua estis elektita prezidento; la dua, vic-prezidento. Dum tiu mandato de Adams okazis multaj malfacilaĵoj kaj eĉ skandaloj. La rilatoj inter Adams kaj Jefferson pli kaj pli malboniĝis. Ili ambaŭ kandidatiĝis denove en 1801. Jefferson venkis kaj estis la unua prezidento de la XIX-a jarcento. Li estis elektita duan fojon en 1805 sed tiu dua mandato finiĝis malpli bone ol ĝi komenciĝis. Jefferson daŭre estis tamen unu el la herooj de Ameriko.

La destino faris, ke, la 4-an de julio 1826, dato de la kvindeka datreveno de la Deklaracio de Sendependeco, Thomas Jefferson mortis okdek tri jara. Li mem skribis sian epitafon kiu, per simplaj vortoj, resumis lian publikan agadon:


" Tie kuŝas Thomas Jefferson, verkinto de la Deklaracio de Sendependeco, de la virginiaj leĝoj pri religia libereco kaj patro de la Universitato de Virginio."

La saman jaron mortis ankaŭ lia politika malamiko John Adams.

Thomas Jefferson restas la patro de la teksto de la Deklaracio, kiu, por la "fondo-patroj" estis la pravigo de la Milito por Sendependiĝo; por multaj historiistoj la plej grava ŝtono en la konstruado de la moderna Ameriko. Por la pli multo el la Eŭropanoj ĝi estas la simpla listigo de sakraj rajtoj, unua formo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

P.B.

Fonto: Les Grands Revolutionnaires
Editions Martinsart



Bakĥo



"Kaj li revenis el Kanao en Galileon, kie li estigis el akvo vinon"-
Sankta Johano IV-46 -

Sed kvankam la Biblio, en multaj versoj, celebras vinon, en la Antikvaj Tempoj vino estis objekto de mita kreaĵo. Bakĥo, dio de l'vino en mitologio, nomita france kaj angle Bacchus el la latina nomo,, aŭ Dionizos el la greka, estis prifestata, kiel kunportanto de ĝojo aŭ de ĉiuj supozataj vinaj bonfaroj por la homa sano. Vizitantoj nuntempaj ĉe multaj muzeoj, ekvidos multajn statuojn, bareliefojn aŭ pentraĵojn pri la Dio kaj ties legenda vivo. La mitologia Bakĥo havis patron, Sileno, edzinon Ariadna, diversajn akompanantojn: Bakĥantinojn, la paŝtistan dion Pajno, satirusojn kun kornoj kaj bestaj piedoj. Tiujn Dion kaj subdiaron oni ĉiam vidas dancantaj, simbolantaj la homan ĝojon.

Honore al Bakĥo kaj sekvantaro oni ofte procesiis, festadis en Grekio, en Romio, eĉ, pli frue, en Egiptio. Tiel estis celebrataj la bonfaroj de la produktiva tero. La ritoj ĉe procesioj ilustris la legendan vivon de la Dio. Aro multnombra da infanoj, per hedero kronitaj kaj portantaj vinberarojn kuris kaj dancadis antaŭ ĉaro kun la bildo de la Dio lokita sur lulilo el vitobranĉaro kaj ĉirkaŭita de maskoj tragikaj aŭ komikaj. La sekvantaro kunportis vazojn, lirojn, flagrubandojn, tamburojn, flor-ornamaĵojn, ktp. Ĉe la fino de la procesio venis verkistoj, poetoj, kantistoj kaj ĉiuspecaj muzikistoj, dancistoj, por kiuj la vino estas fonto de arta inspiro. Oni trovas longan priskribon de tia porvina luksa kaj grandioza festo okazintan en Aleksandrio sub la regado de Ptolemeo Filometor, reĝo de Egiptio de la 116-a ĝis la 107-a jaroj antaŭ Kristo.

Nunepoke ni kutime festas malpli solene la gloron de l'vino. Tamen ĝia kulto ne malaperis eĉ se ĝi fariĝis pli diskreta. En Anĵua regiono, kie vito riĉmaniere kultiviĝas, oni ĝin celebras. Turistoj povas eniri trinkejojn, kie nemultbabilemaj homoj sidas ĉe tabloj por gustumi "fillette" (fijet') da blanka dolĉa vino. Tiu "fillette" en ordinara franca lingvo signifas "filineto", sed tie, en Anĵuo, ĝi signifas boteleton trionlitran. Ankaŭ okazas specialaj vinofestoj en keloj, ne por komplotuloj, sed por societoj de vinamikoj, kiel la "Fins Gousiers" (Spertaj Gustumantoj) vestitaj per belaj roboj, ornamitaj ĉapoj, kaj surhavantaj kolĉenojn kun medalo kaj gobeletoj. Ili estas la celebrantoj de la bona vino.

Norde de Gresillon, je 18 kilometroj for, troviĝas la urbo La Flèche (La Fleŝ). Apud la rivero Le Loir, dekstre staras ronda konstruaĵo, la festoĉambrego "Kopelia" laŭ la nomo de baletisto de la fama komponisto Leo Delibes naskiĝinta en tiu urbo en la XIX-a jarcento. Liaj du dancmuzikoj "Kopelia" kaj "Silvia" estas ankoraŭ nuntempe ofte prezentataj. La spektantoj de la ĥordanco Silvia, mitologia temo pri amaventuro de la diino Diana, povas ĝui, dum la tria kaj la kvara aktoj, la envenon sur la scenejo de la ĉaro de Bakĥo kun dancanta sekvantaro, Sileno, Bakĥantinoj, Satirusoj, Faŭnoj. Espereble kelkaj el niaj legantoj havos la ŝancon vidi ilin en sia lando aŭ en La Flèche, kiam en 1991 estos tie celebrata la jubileo de la centjara datreveno de la morto de la komponisto.

René - Watier



PAĜO DE LA GEKNABOJ



LULO KAJ NULLANDI (2)

Aŭstralia indiĝena legendo

"Kial vi ridadis hieraŭ vespere?" demandis Lulo. "Pro via ridaĉo kaj la plorado de mia edzino, mi ne povis dormi."

"Kial via edzino ploris?" demandis Nullandi.

"Mi klarigis al ŝi, ke morto similos al la mallumo post sunsubiro."

"Vi malpravas," Nullandi asertis. "Neniu vere scias, sed mi kredas, ke morto estas kvazaŭ ni fermis la okulojn kaj malfermis ilin post momento."

"Vi, stultulo!" Lulo grak-diris.

Nullandi respondis: "Ni ne estas kiel floro, kiu burĝonas kaj velkas en unu tago. Ni estas infanoj de la Granda Spirito, kaj nia heredaĵo estos eĉ pli bela loĝejo ol ĉi tiu mondo."

Lulo kontraŭdiris: "Ĉi tiu ne estas bela mondo. Ofte ni soifas, ofte malsatas. Ne, nenio daŭros, niaj spiritoj velkos kaj ĉesos. Nur restos mallumo."

Nullandi ekakrigis sian lancpinton, ĉar li iros ĉasi kanguruon por tagmanĝo. "Pensu tiele," li diris, "se plaĉas al vi. Sed ne malgajigu vian edzinon. Se vi mem volas esti blua fiŝo en la profundo de la maro post morto, estu! Sed kompatu la edzinon, lasu, ke ŝi estu feliĉa."


"Kaj vi, Nullandi, vi permesu, ke via edzino formu sian propran opinion. Kion, laŭ via ideo, okazos al vi kiam vi kuŝas mortinta sur la ebenaĵo, kaj la dingo venas manĝi vian karnon?"

Nullandi paŭzis, pensadis. "Vere mi ne scias, Lulo. Estos la volo de Bajami. Sed mi diras al vi: se estos multaj homoj kiel vi en la mondo, kiuj timegas la mallumon, eble Bajami faros al mi lumon por trankviligi ilin."

Post longa vivdaŭro, Nullandi kaj Lulo malfortiĝis, kuŝiĝis kaj mortis. Lulo iĝis blua fiŝo kaj nelonge vivis ĉe la profundo de la maro ĝis pli granda fiŝo formanĝis lin. Liaj ostoj falis en la kotan profundon kaj kuŝis tie ĝis ili dispeciĝis. Lulo ne plu estis.

Sed Nullandi, la feliĉulo, supreniris al la ĉielo, al la hejmo de Bajami, kaj la Granda Spirito faris lin ronda kaj brila luno. Eĉ kiam li malkreskis kaj iĝis maldika, kiel splito de arboŝelo, homoj sciis, ke li ree kreskos, same kiel iliaj spiritoj mortos etfoje, sed revivos kaj vivos ĉiame. Nullandi, do, iĝis Bahluo, la gaja Dio de la Luno.

Onklino Ĝina el Aŭstralio



Voĉa - Senvoĉa

LUDO

Ni proponas al vi "fonetikan" ludon. Oni ja scias, ke kelkaj konsonantoj tre similas unu la alian: se ili havas saman artikulation kaj distingigas nur per tio, ke la unua estas voĉa kaj la alia senvoĉa, ili formas parojn. En Esperanto ni havas sep tiajn konsonantajn parojn:

voĉaj: b d g ĝ j v z

senvoĉaj: p t k ĉ s f ŝ

Tiuj 14 literoj prezentas la duonon de nia alfabeto. Oni povas formi vortoparojn tiel, ke unu voĉa elemento de la unua vorto fariĝas senvoĉa en la dua vorto, dum la ceteraj literoj restas la samaj, sendepende de tio, ĉu la nesangigantaj literoj estas mem voĉaj aŭ senvoĉaj, ekz. vorto - forto, kabo - kapo.

La ludo konsistas en tio, ke helpe de la gvidiloj oni retrovu la enprogramigitajn parojn. Por faciligi vian cerbumadon, aperas ĉiam la sama vico, a) la gvidilo rilate al la vorto kun koncernata voĉa konsonanto, b) al tiu kun respondanta senvoĉa fonemo. Aliparte la vortoj de la dek unuaj paroj estas kvarliteraj, kaj la ceteraj kvinliteraj.

Ĝen la gvidiloj:

- 1- parto de a) vestaro; b) kuirilaro;
- 2- en la ĝardeno ĝi estas a) legomo; b) arango;
- 3- a) trinkaĵo; b) lasta punkto;
- 4- io malŝatata a) de ŝoforo sur la vojo; b) de malbonaj dormantoj;
- 5- en la butikotio devas fari a) la acetanto; b) la vendisto;
- 6- ĝi vivas a) en aŭ apud akvo; b) sur nordaj ebenaĵoj;
- 7- speco de a) malliberejo; b) manĝaĵo el terpomoj aŭ io alta;
- 8- maloportunaĵo por a) aganto; b) kapito;
- 9- a) kontaktilo; b) atentinda situacio por reĝo;
- 10- la poembiron ĝi a) laŭdire inspiras, b) kelkfoje detruas;
- 11- a) kuraĝa, sentima; b) ĝuste opinianta;
- 12- manĝaĵojn ĝi a) povas enteni; b) devas ricevi;
- 13- parto de a) la vizaĝo; b) ekzameno;
- 14- fari kiel a) korvo; b) brulanta ligno;
- 15- ĝi estas a) malgranda por esperantisto; b) granda por alpisto;
- 16- nomo de a) tago; b) ekzameno;
- 17- a) ŝirmilo por la korpo; b) malstreĉigilo por la spirito;
- 18- ĝi troviĝas a) sur la manĝeja tablo; b) en lernejo k.c.;
- 19- plezurobjekteto por a) somerumantoj; b) ŝatanto ĝeneralence;
- 20- bazo de a) monŝango; b) instruado.

Solvo de la ludo

13-

	a)	b)
1-	boto	poto
2-	beto	bedo
3-	vino	fino
4-	kavo	kafo
5-	pagi	paki
6-	alĝo	alko
7-	kaĝo	kaĉo
8-	ĝeno	ĉeno
9-	ĵako	ŝako
10-	muzo	muso

	a)	b)
11-	brava	prava
12-	korbo	korpo
13-	brovo	provo
14-	graki	kraki
15-	mondo	monto
16-	mardo	marto
17-	vesto	festo
18-	glaso	klaso
19-	plaĝo	plaĉo
20-	kurzo	kurso

POR VIA

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	P	R	I	L	A	B	O	R	I
2	R	I	N	O	C	E	R	I	N
3	A	P	O	G		K	A	B	E
4	K	O	K	I	D		K	O	R
5	T		U	K	A	Z			T
6	I	E	L		K	E	L	K	E
7	K	R	I	S	O	L		R	C
8	A	B		A	T	O	L	O	
9	N	I	E	L		T	E	N	I
10	T	O	K	O	L	O	G	I	O

DISTRO

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									
10									

Horizontale: 1- Manio, kiu nuntempe, manifestiĝas precipe per neologismo. 2- Li (aŭ ŝi) estas kultata, ĉefe de la gejunuloj - Frukto (s.f.). 3- Dornohava molusko. 4- Oficiala dokumento - Senkarna. 5- Sur aŭtomobilo el Borneo - Prepozicio - Prepozicio. 6- Ligna perkutinstrumento. 7- Dombesto malsame takсата tra Eŭropo. 8- Ĝi ruĝigas la lumreklamilojn Estigo, fondo (s.f.). 9- Gravaj akcesoraĵoj de montaj fervojoj. 10- Turka oficiro - Nejudo.

Vertikale: 1- Atentinda. 2- Bredis aŭ kulturis plantojn - Maltrankviliga, kiam ĝi estas ebena (siglo). 3- Kiam ĝi ordonas, leĝo pardonas (s.f.) - Rilata al kultobjekto de ortodoksuloj. 4- Arakido, kolzo, helianto ekz. 5- Konsistiga materialo de la terkrusto (s.f.) - Parto de helikoptero (s.f.). 6- Forte deziri - Sufikso, kelkfoje uzata prefikse. 7- La rakonta poezio - Oĉjo por la nevo. 8- Persona pronomo - Kantistoj. 9- Kulturaj Kajeroj estas tiu de Gresillon - Lokalo.

LA VIVO EN GRESILLON

Dum la tuta jaro ni publikigas en tiu ĉi rubriko la raportojn de la kunvenoj de nia Komitato. Tiel, niaj legantoj sekvas la ĉefajn okazaĵojn de la vivo de la Esperanto-Domo. La ĝenerala kunveno de la 8-a de aprilo ebligas la grupigon de tiuj disaj okazaĵoj, favore al la ĉeestantoj, kun aldono de detaloj, ekzemple koncerne la finanĉan flankon. Ĝi estos ankaŭ okazo por la ĉeestantoj fari demandojn al la responduloj, kaj proponi eventualajn ŝanĝojn. Tiu estas la rolo de Ĝenerala kunveno: rigardo al la antaŭa jaro kaj difino de celoj por la sekvonta. La Komitato, kiu kunvenos dimanĉon, havos gravajn decidojn por fari.

Unu el la temoj verŝajne estos la ĝenoj okazigitaj, dimanĉe kaj sabate, de la ŝanĝo de horaro de la aŭtobuso Le Mans-Saumur. Ni preparis specialan informilon sendotan al la petantoj; sed ni opiniis oportune aperigi la novan horaron en la revuo. Vi trovos ĝin sube:

	<u>HORARO</u>						
	lundon-mardon		vendredon			sabaton	dimanĉon
	merkredon	ĵaŭdon					
Paris-Montparnasse	9.50	14.36	9.50	14.36	17.24	9.50	17.24
Le Mans: alveno	11.35	16.22	11.35	16.22	19.04	11.35	19.04
foriro:	12.25	17.25	12.25	17.25	19.10	12.25	20.20
Baugé (<i>pleno de la kantoj</i>)	13.31	18.31	13.31	18.31	20.13	13.31	21.28
Saumur: alveno	14.10	19.10	14.10	19.10	20.45	14.10	22.05
foriro	14.58	20.09	14.58	20.09	--	14.58	--
Tours	15.37	20.53	15.37	20.53	---	15.37	--

	<u>HORARO</u>							
	lundon		mardon-merk.		vendredon		sabaton	dimanĉon
		ĵaŭdon		ĵaŭdon				
Tours	6.42	16.09		16.09		20.12		17.59
Saumur: alveno	7.24	16.49		16.49		20.44		18.31
foriro	7.28	16.58	6.53	16.58	6.53	16.58	6.53	18.36
Baugé (<i>pleno de la kantoj</i>)	8.01	17.34	7.29	17.34	7.29	17.34	7.29	19.03
Le Mans: alveno	9.25	18.48	8.55	18.48	8.55	18.48	21.45	20.08
foriro	9.45	18.58	9.52	18.58	9.52	18.58	(La Flèche) 9.52	20.18
Paris Montparnasse	11.26	20.38	11.32	20.38	11.32	20.38	--	22.07

PERKORESPONDAJ KURSOJ

ALVOKO al la lernintoj de la perkorespondaj kursoj!

Ni ŝatus koni vian opinion pri la prezentado, klarigoj, ekzercoj de niaj tri kursoj. Bonvolu sendi viajn respondojn al S-ino VINCENT, 26bis rue de Milngavie, 49150 BAUGE.


Por la komencantoj: 16 lecionoj ilustritaj; kurso kaj korektado: 150 f.

Praktiko-kurso: 14 lecionoj ilustritaj; kurso kaj korektado: 150 f.

Supera kurso: detradukoj, altradukoj, studo de tekstoj, 100 f.


Aliĝoj kaj ĉekoj al: Maison Culturelle Esperantiste, 49150-BAUGE.
poŝtkonto: Nantes 1485-39 P.

LA FOLIOJ BRULAS




LI BRULIGAS LA FOLIOJN

LI LABORAS



LI LABORIGAS SIAN FRATON

1° LI TRINKIGAS SIAN BOVINON JE AKVO
2° LI TRINKIGAS AKVON AL SIA BOVINO



LI TRINKAS AKVON
(ilustr. : M. Perraud)

(Ilustraĵo el nia PRAKTIKO-KURSO)

VOJAGO AL BULGARIO

Projektita estas komuna vojaĝo de dek du Francoj al la Esperanto Kursejo Pisanica en Bulgario. Interŝanĝe dek du Bulgaroj venus al Gresillon. La Francoj pagus la restadon de la Bulgaroj en Gresillon kaj estus gastigitaj senpage en Pisanica. Informas: J. Turbillon, 4 jardin Ockeghem, 37000 TOURS.

NIA LIBRO-SERVO

GRAVE- Sur viaj ĉekoj nepre sribu la nomon: Maison Culturelle Esperantiste, kaj neniu alia nomo.

- La adreso de la Libro-Servo estas nun: S-ino J. VINCENT, 26bis rue de Milngavie, 49150 BAUGE.

-Ne forgesu peti nian katalogon.

NIA KONKURSO



Aperos en la venonta numero de Kulturaj Kajeroj (1989-2) la listo de la gajnintoj. Tiuj ĉi estos intertempe ricevintaj personan leteron.

Jen la respondoj al la diversaj demandoj :

UNUA SERIO :

- 1) — Pro la apuda dolmeno.
— Pro la malkovro de la planedoj « Esperanto » kaj « Zamenhof ».
— En la Paradizo la mortintoj ĉasis kaj fiŝkaptis.
— Flava : la enspirado de safrano naskas ridegon ; verda : = ruino, honto.
- 2) — « La plej grava leĝdonanto estas la uzado » — (Letero de L.L. Zamenhof al Dr. Kimel).
- 3) — « Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj » — 1954. « La Vivo de la Plantoj » — 1957.
- 4) — Jes — ne (1954) - jes — ne (belgo) — ne (Int. Esp. Asocio de Juristoj).

DUA SERIO :

- 1) — La bufonoj ĝuis senlimajn privilegiojn.
— Li ne plu havis la bezonatan monon.
— El la arablingva vorto : « za'faran ».
— Oni asertas, ke en El Toboso vivis « Dolĉulino », kiun Don Quijote amis.
— Kapitano Cook erare opiniis, ke Aŭstralio estas senhoma insulego.
- 2) — La urbo Cannes.
- 3) — Franz Jonas, urbestro de Vieno kaj poste prezidento de Aŭstrio.
- 4) — Jes — ne (Int. Katolika Unuiĝo Esperantista) — ne (Toronto 1957) — jes — ne (Skotlando kaj Danzig ne estas landoj).

TRIA SERIO :

- 1) — Aristotelo studis la vivantaĵojn.
— Francisko la Unua.
— Kolektiva verko sub la gvidado de C. Piron en Grésillon.
— Por malhelpi ilin plumiliti.
— La poeto Jose Marti en 1891.
- 2) — « La nuda Vero » G. Salan — « La Diroj de Mateo » C. Freinet — « La ĝardeno de l'urbestro » L. Gabrielli
— « Sur kampo granita » I. Nemere
— Printempo en la Aŭtuno » J. Baghy.
- 3) — Antverpeno.
- 4) — Ne (Borsboom) — jes-ne (1955) — (1958) — ne (Centro de Dokumentado kaj Esploro...).

KVARA SERIO :

- 1) — Por Camus la artisto estas « ribelanto ».
— Li redonis al Gallius Terrinius, blindulo, vivemon.
— El la « Proverbaro » de Zamenhof.
— Ŝi mortis en la flamoj de ŝtiparo.
— 20 landoj.
- 2) — « Transe » Lorjak — « Ŝia lasta poŝtkarto » Serĝo Elgo — « Kun siaspeca spico » R. Schwartz — « Tra dezerto kaj Praarbaro » H. Sienkiewicz — « La fermita urbo » I. Nemere.
- 3) — Edmond Privat.
- 4) — Ne (Lanti) — ne (Ligo Int. de Blindaj Esperantistoj) — jes — ne (krom en la unuaj kvin numeroj) — jes.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — Exeter, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).
Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).
Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).
Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).
Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (70 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.